

N°195
juillet
août
septembre
2021

LA INFORMILO

N° 195
julio
aŭgusto
septembro
2021

l'espéranto
la langue de l'amitié
sans frontières

esperanto
France-Est

ESPERANTO
2021
Justa komunikado

esperanto
★ estas ★
mojosa!

ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale

ESPERANTO

regroupant
les départements

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)

Meurthe-et-Moselle (54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Vosges (88)

Maison des Jeunes
et de la Culture

"Philippe Desforges "

27, rue de la République

FR-54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO

Papera versio: 18 €

Reta abono: 7,50 €



La pandémie qui a ralenti l'activité humaine dans le monde entier a certes empêché les locuteurs de la langue internationale ESPERANTO de participer au traditionnel congrès mondial de l'Association Universelle d'Espéranto qui avait l'habitude de se tenir dans l'un des 110 pays où l'espéranto est pratiqué, mais ils ne sont pas restés inactifs pour autant.

La preuve: le succès du "Belarta Konkurso", qui met en compétition des auteurs de chansons, de pièces de théâtre, d'essais, de nouvelles et de romans. Et pour ce deuxième congrès virtuel un record de contributions a été enregistré: 186 œuvres ont été envoyées aux jurys des différentes catégories.

Chaque année les œuvres primées sont éditées par la maison d'édition MONDIAL et connaissent un grand succès.

PRAKTIKADO DE LA LINGVO EN KVINPETALO

de la 5a ĝis la 9a de julio 2021

raportas Liba Gabalda

Post kelkaj jaroj ni denove vizitis la Kultur-centron Kvinpetalo. Ĝi situas proksimume kvardek kilometrojn sude de Poitiers. Post longa paŭzo kaŭzita de pandemio pro la kovim-viruso, kiu aperis fine de la jaro 2019 ni deziris praktiki la lingvon. Kun ĝojo kaj entuziasmo akceptis nin Catherine Kremer. Ni estis la solaj partoprenantoj de la semajna staĝo. Tio taŭgis al ni. Kun ŝi ni faris multajn ekskursojn por ekkoni la proksiman kaj iom foran ĉirkaŭaĵojn.

Unue Catherine promenis nin tra la domaro el kiu konsistas Kvinpetalo. Ni rememoris la ĉambrojn, kie ni staĝis antaŭ ok jaroj. Poste ni promenis tra la vilaĝo *Bouresse*, kie la kulturcentro troviĝas. Preter la loka preĝejo ni haltis ĉe la



tombejo. Poste ni scivoleme eniris grandan, ĵus aĉetitan bienon de nova posedanto. Antaŭ la tagmanĝo restis iom da tempo por legado. Catherine bone kuiris kaj la najbarino Claudette kontribuis per legomoj el sia ĝardeno kaj pretigis vegetaran manĝon por ni.

La sekvan tagon ni veturis al la proksima urbeto *Lussac-les-Châteaux*, preterpasante en *Mazerolles* la preĝejon *Saint-Romain* kun speciala mur-sonorilejo unika en tiu regiono kaj registrita kiel historia monumento. En *Lussac* ni vizitis la muzeon de prahistorio. Mi rememoris survitre pentritajn rabobirdojn. La vitrinaj de la muzeo estas dediĉitaj al eltrovaĵoj de la regionaj grottoj. Poste mallonga promeno

kondukis nin al grottoj. Starante en akvo impresas grandaj pilieroj de la kastela lev-ponto.

Post la vizito nia vojaĝo direktiĝis al *L'Isle Jourdain* por admiri la viadukton konstruitan inter la jaroj 1881-1884. Ĝi estas je 40,25 metrojn alta, 304 metrojn longa kaj havas 12 arkaĵojn. La fervoj-trafiko ĉesis sur ĝi en la jaro 1969-a. De tie estas bela rigardo al la urbo.

Merkrede ni vojaĝis al la mezepoka urbo *Chauvigny*, kie ni ĝuis eksterordinaran spektaklon de rabobirdoj en la amfiteatro de la ruinigita kastelo el la 12-a jarcento. Prezentiĝis ne nur la diversaj konataj rabobirdoj, sed ankaŭ papagoj, vulturoj, kukaburo, kiu devenas el Aŭstralio kaj Novgvineo kaj iom similas al alciono. El Sudameriko venis alia, nekutima birdo "Cariama". Ĝi tute ne flugas, sed tamen povas kuri ĝis 25 km hore kaj salti je 3



Chauvigny



metroj alte. La tuto estis substrekita per taŭga muziko kaj la prezentistoj en tipaj kostumoj aldonis al la spektaklo specifan atmosferon. Poste ni povis observi diversajn birdojn de proksime en iliaj kaĝoj. Ne mankis ankaŭ cikonioj. La trejniĝo de la birdoj postulas du jarojn por atingi perfektan kapablon de kunmoviĝo. Samtempe ni admiris diversajn florojn kaj plantojn. Subite venis forta pluvo, kiu forpelis nin de la loko. Posttagmeze ni vizitis nekropolon; gaŭlo-romian tombejon en *Civaux*. Videblis ŝtonaj sarkofagoj kun skriboj sur la merovaj kovriloj el la 500-750-aj jaroj post Kristo. Ankaŭ de tie forpelis nin la pluvo. Ne tre fore staras nuklea centralo. Ĝian fumon oni rimarkas de malproksime.

Dum la tuttaga ekskurso ni veturis pli malproksimen. Kunvojaĝis ankaŭ Claudette. Trapasante la urbon *Antigny*, ni por momento haltis en *Saint Savin* kaj eniris la abatejan preĝejon de la 11-a jarcento por vidi navon ornamitan per freskoj. Imponas la alteco de la konstruaĵo je 77 metroj. Ĉe la alveno rimarkiĝas la ponto el la 13-a jarcento sur la

rivero *Gartempe*, kiu kunigas la urbojn *Saint Savin* kaj *Saint Germain*. Daŭrigante ni baldaŭ atingis la urbeton *Angles sur l'Anglin*. De malproksime vidiĝis konturoj de la ruinigita fortikaĵo. En turisma informejo ni aĉetis biletojn por viziti ĝin kaj ankaŭ la alian lokon rilatan al prahistorio - *Roc-aux-Sorciers*.

Nia posta celo estis la urbo *La Roche Posay*, kie ni rendevuis kun Bernard Lagrange kaj ni kune piknikis sur benko de la placo. Post la kafumado ĉe proksima trinkejo Bernard promenis nin tra la urbo. Ĝi estas banloko por kuraci haŭtmalsanojn. En ĉefturo ni povis spekti nekutiman videon plafone projekciitan. Ĉie, en tiu ĉi regiono, mi admiris divers-kolorajn rozalteo-florojn.

Revene hejmen ni haltis en *Montmorillon* - vizitinda urbo de arto kaj historio. Krom aliaj vidindaĵoj tie impresigis nin la ekspozicio en la muzeo pri skrib- kaj kalkulmaŝinoj.

Angles sur l'Anglin



La Roche Posay



Kun Catherine Kremer ni pasigis tre agrablajn tagojn en akompano de ŝia hundeto. Ŝi preparis interesajn itinerojn kaj pro ŝia sperto de profesia turisma ĉiĉeronino ni multon eksciis. Certe ni ŝatus denove reveni al *Bouresse* kaj viziti aliajn lokojn en la ĉirkaŭaĵo. Venu ankaŭ vi al la Kvinpetalo por subteni kaj revivigi la staĝejon. En trankvila vilaĝo kaj riĉa regiono je vidindaĵoj vi povas pasigi agrablajn tagojn, same kiel ni.

Liba Gabalda



Ĉi-somere estis proponita en la kastelo de Gresijono de vendredo la 23-a de julio ĝis lundo la 2-a de aŭgusto 2021

Maratona E-kurso, IEK, AMO, FEI-ekzameno

33-a Internacia Esperanto-Konferenco IEK kaj 75-a Aktivula Maturigo AMO



Jen konata bildo de la kastelo, kiu dank'al la prizorgoj de Ĵanik kaj Bert Schulann daŭre funkcias.



Kiam favoris la vetero kun sunbriloj, estis agrable sidi ekstere antaŭ la kastelo. En iuj tagoj multaj preferis manĝi ekstere. Tamen la vetero estis ankaŭ iom kaprica kaj minacaj nubaj ofte kunportis pluvojn en iuj tagoj. Tiam ni havis la impreson, ke jam aŭtunas en somero.

La kastelo de Gresijono denove povas organizi staĝojn, semajno-finojn, renkontiĝojn por akcepti esperantistojn kun diversaj celoj.

Jen tiu de la fino de julio estis aparte alloga por komencantoj, progresantoj kaj ankaŭ por la nivelo C1-C2 pri Esperanto kaj kulturo.

Entute aliĝis pli ol 40 personoj.

Marc Giraud gvidis la kurson por komencantoj kaj komencintoj (A1-B1).

Renée Triolle proponis Esperanto-kursojn pere de diskutoj (B2-C1)

Ilona Koutny el Poznano, Pollando, proponis prelegojn pri Lingvo kaj kulturo, pri problemoj de Esperanto-gramatiko, Esperanto-vortprovizo.

Pri Esperanto en universitatoj. .

Tiuj kursoj kaj prelegoj okazis ĉiu-matene de la 9a ĝis ka 12a30.

En la posttagmezoj Ĵanik proponis diversajn promenadojn al Baugé por viziti la kastelon, la malnovan apotekon. Ni ekkonis la verdan vojon malantaŭ la kastelo. Tre taŭga vojo por la biciklantoj kaj promenantoj.



Malgraŭ pluvetoj ni atingis la meniron en la arbaro



La verda vojo malantaŭ la tereno de Grezijono estas tre oportuna por piede aŭ bicikle atingi la centron de la urbo Baugé kaj ties kastelon. Ni ankaŭ vizitis la malnovan apotekon de Baugé, kiu siatempe ankaŭ funkciis, kiel hospitalo. La flegadoj estis ankoraŭ laŭ malnovaj tradicioj kaj kredoj.



En la vesperaj programoj okazis diversaj prelegoj: Renée Triolle parolis pri la franca literaturo kaj prezentis bidojn pri Provenco. Catherine Kremer parolis pri la Renesanco. Tre oportunaj klarigoj ĵus antaŭ la tut-taga ekskurso al Langeais kaj Azay-le-Rideau.



Partoprenis la aranĝon 40 personoj ĉefe el Francio. Okaze de promenadoj ĉirkaŭ la kastelo Ĵanik bone klarigis pri la



vasteco de la tereno ĉirkaŭe. Tie troviĝas arbaro, kiu ja povas alporti enspezojn por Grezijono. Dank'al tiaj klopodoj la kastelo certe sukcesos plu-vivi.



Tut-taga ekskurso al Kasteloj en Landais kaj Azay-le-Rideau

Per 9-persona buseto nin gvidis Ĵanik kaj Catherine. En Langeais ni vizitis la imponan kastelon konstruitan de 1464 ĝis 1466. Tie okazis la kaŝa geedziĝa ceremonio de Karolo la 8a kun Anna de Bretonio (tiam nur 17-jara). Interne de la kastelo eblis vidi la scenon de tiu geedziĝo kun la historiaj klarigoj de Stephane Bern.



Ekster la kastelo okazis prezentado de rabo-birdoj, kiuj forflugis kaj revenis al sia mastro por kapti rekompenson. Tial ni vidis vulturojn strigojn, aglojn, kiuj majeste traflugis la aeron kaj bele superflugis la kapojn de la spektantoj.



Jen la ĉarma renesanca kastelo de la 18-a jarcento en Azay-le-Rideau. Ĝi estas konstruita sur insulo de la rivero Indre laŭ la decidoj de la reĝo Francisko la unua. La pejzaĝa parko estas de la dua duono de la 18a jarcento



Revene de la ekskurso ni haltis momente por admiri la reĝ-fortikaĵon de Chinon kaj en la urbo Saumur ni preterpasis alian kastelon. Ankaŭ eblis ĝui la ĉarman panoramon de la rivero Loire (luar) kun ties ponto.



Raportas pri sia restado en Greziljono en julio 2021 Liba Gabalda

Fine de julio ni pasigis unu semajnon en nia Esperanto-kastelo Greziljono. Ĝi situas du kilometrojn de la urbeto *Baugé* (Boĵe), kie ankaŭ troviĝas kastelo, kiun ni vizitis. En la Luar-valo troviĝas multaj kasteloj, burgoj, ruinoj kaj diversaj fortikaĵoj.

Ekde la 23-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 2021 okazis en la Kulturdomo de Esperanto-kastelo Greziljono pluraj Esperanto-eventoj: la 5-a Maratona E-kurso, la 33-a Internacia E-konferenco (IEK) pri "Naturo, Scienco, Arto", du-taga 75-a Aktivula Maturigo (AMO) pri "Kulturo pere de Esperanto" kaj ekzamenoj de la Franca Esperanto-Instituto (FEI).

La aranĝon partoprenis kvardek geesperantistoj, plejparte el Francio. Okazis trinivelaj E-kursoj, gvidataj de renomaj esperantistoj: Ilona Koutny, Renée Triolle kaj Marc Giraud.

Ni ĉeestis nur partatempe por ĝui Esperanto-etoson en tiu bela kastelo. Ni frekventis la kurson de Ilona Koutny, kiu naskiĝis kaj edukiĝis en Hungario, sed ekde la jaro 1997 loĝas en Pollando en la urbo Poznan, kie ŝi gvidas post-diplomajn Interlingvistikajn studojn ĉe la Universitato Adam Mickiewicz.

En la programo estis inkluzivitaj diversaj interesaj prelegoj, ekskursoj en la ĉirkaŭaĵo kaj al pli foraj lokoj.

La tuttaga ekskurso gvidis nin al urbetoj *Langeais* kaj *Azay-le Rideau*, kie troviĝas kasteloj. Mi kun Floreal preferis promeni kaj admiri tiujn pitoreskajn urbetojn. Revene de la ekskurso ni por momento haltis rigardante la reĝfortikaĵon *Chinon* kaj en la urbo *Saumur* ni preterpasis alian kastelon.

Dum la semajno okazis prelegoj pri kronviruso, Catherine Kremer parolis pri la Renesanco antaŭ la ekskurso. Renée Triolle parolis pri franca literaturo en Esperanto kaj prezentis bildojn pri Provenco (ŝia bela regiono). Ilona Koutny parolis pri esperantlingva bildo de la mondo. Andreo Grossmann prezentis trompajn bildojn kaj rakontis ŝercojn. Prelego pri jidaj lingvo kaj kulturo prezentis Elias Seidowsky.

Dum la AMO-seminario François Lo Jacomo prizorgis video-konferencon kun Stefan MacGill, kiu bonvenigis la partoprenatojn kaj transdonis parolon al la aliaj

prelegantoj kun kiuj ni povis komuniki sur-ekrane. Ĉe la fino li skizis AMO-seminariojn de 1 ĝis 75.

Renée Triolle el Francio prezentis: Esperanto-kaŝita interkulturilo. François Lo Jacomo el Francio prezentis: Esperanto-kulturo aŭ kulturo pere de Esperanto? Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova el Rusio parolis pri Libro-eldonejo Impeto. Malgosia Komarnicka el Pollando prezentis: Esperanto en neesperantista medio-agoj de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado. Ilona Koutny el Pollando prezentis:



Jam la lasta vespero: la organizantoj proponis por kune festi dolĉan vinon kaj ŝaŭm-vinon. Ni varme dankis al ili pro la bona organizado kaj agrabla restado en la kastelo.

Esperanta kulturo kaj ĝia instruado. Laure Patas d'Illiers el Francio prezentis: Sciencfikcio kaj Esperanto. Vespere okazis projekciado de bildoj, diversaj prelegoj kaj diskutoj, kaj poste oni povis ludi tablo-ludojn aŭ nur babilu kun geamikoj. Regis agrabla etoso kaj ni estis kontentaj, ke ni povis renkontiĝi kun konatoj kaj praktiki Esperanton.

Revene hejmen ni haltis en la urbeto *Le Lude*, kie ankaŭ troviĝas impona kastelo. Mi promenis en ĝia ampleksa ĝardeno. Daŭrigante survoje ni enrigardis la korton de la kastelo *Châteaudun*. Restis ankoraŭ longa vojo por atingi nian hejmon.



| | | | | | |
|--|--|--|---|--|--|
| Espéranto France-Est http://esperanto.france.est.free.fr. | |  | | Orient-Franca Esperanto-Asocio. | |
| La Informilo | | Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO | | Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo ESPERANTO | |
| Rédaction: Redaktoro: | | Edmond Ludwig kaj André Grossmann | | S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM | |
| Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants: | | Article manuscrit à éviter Texte envoyé par courriel doc, odt Document avec mise en page (PDF) marges identiques à cette page-ci | | un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre | |
| Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers. | | | | | |
| Komitato de la Asocio | | | Comité de l'Association | | |
| Funkcio | Adreso | Telefono | Ret-adreso | | |
| Prezidanto <i>Président</i> | S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR | 03.89.77.52.56 | esperanto.eludwig@orange.fr | | |
| Libroservo <i>Service Librairie</i> Sekretario | S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE | 03.83.53.57.54 | jean-luc.thibias@laposte.net libroservo.efe@laposte.net | | |
| Kasisto - Redaktoro <i>Trésorier - Rédacteur</i> | S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM | 09.86.38.78.61 | andreo.ag16@sfr.fr | | |
| Aliaj komitatanoj <i>Assesseeurs</i> | S-ino Liliane BERSWEILER | 03.83.47.41.36 06 76 54 77 78 | liliber54@yahoo.fr | | |
| | S-ino Micheline COLNOT | 03.83.27.46.93 | michelincolnot@orange.fr | | |
| | S-ro Jacques HERLÉ | 03.87.01.00.39 | jacques.herle@laposte.net | | |
| | S-ro Michel Basso | 03.89.80.86.12 | clbm@orange.fr | | |
| | S-ino Gisèle BERTAPELLE | 03.83.56.17.37 06.80.68.94.78 | bertapelle.gisele@wanadoo.fr | | |
| | S-ino Catherine HEL | 03.83.47.63.07 | cathello@laposte.net | | |
| | S-ro Gilbert STAMMBACH | 06 87 40 01 16 | gilbert.stammbach@gmail.com | | |
| Abono al La Informilo → | 18 eŭroj | reta abono: 7,50 eŭroj | ← <i>Abonnement à La Informilo</i> | | |
| Pagoj per ĉeko je la nomo de → | Esperanto France-Est | | ← <i>Paiement par chèque au nom de</i> | | |
| Pagoj per ĝiro al jena konto → | CCP 1997 72 W NANCY | | ← <i>Paiement par virement au compte</i> | | |
| Per internacia ĝiro → | IBAN: FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC: PSSTFRPPNCY | | | | |
| Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al → | S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM | | Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier | | |
| 1. Disdono de premioj 2. Staĝo en Bouresse Kvin-petalo 3. Staĝo en Bouresse Kvin-petalo 4. Restado en Grezijono 5. Restado en Grezijono 6. Restado en Grezijono + ekskursoj 7. Restado en Grezijono + ekskursoj 8. Komitatanoj kaj enhavo-listo 9. Angulo + Poemo 10. Poezio + kunveno 11. Edmond Privat 12. Projekto Benino 13. Luminesk' 2021/22 14. Aŭskulteblaj voĉoj | | 15. Libro-servo 16. Abonoj kaj kotizoj 17. Enigmo + anekdotoj 18. Anekdotoj 19. Humoraĵoj + kongresanoj 20. Humoraĵoj + kongresanoj 21. Samarkando 22. Staĝo en Métabief 23. Vojaĝo al Assisiltala kongreso 24. 28 Itala kongreso 29. Pom-arbo + Globobs 30. Promenado en Graufthal 31. Vizito al Poznan + Blainville 32. Foto-paĝo | | ISSN 0291 6037 trimestriel N° CPPAP : 0409 G 83517 Bulletin d'information bilingue sur l'espéranto édité par l'association culturelle Espéranto France-Est MJC PhiJippe Desforges 27 rue de la République 54000 NANCY Directeur de la publication : Edmond LUDWIG Rédacteur provisoire : André Grossmann Dépôt légal : 30 septembre 2013 Imprimé par l'imprimerie Sprenger | |

ANGULO DE LA PREZIDANTO

Estimataj gesamideanoj,



Dank'al la retejo <https://www.liberafolio.org/> ni iom post iom ekscias pri la de la komitato deciditaj-decidataj-decidotaj planoj por la financa situacio de nia tutmonda asocio UEA.

Montriĝas, ke la iom-post-ioma disvolviĝo de la komputaj ilaroj en la vivo de ni ĉiuj puŝis nian ĉefan Esperanto-asocion al iu turno-punkto koncerne ties financon situacion, koncerne la administradon kaj la novan difinon de servoj al la membroj. Krome trovendas novaj strategioj de promociado por nia lingvo ĉe gravaj naciaj kaj internaciaj instancoj.

Bone! Tamen: kiam oni legas pri dismembriĝo de la asocio kaj dislokiĝo de la sidejo, ni bazaj membroj-kiuj dum jardekoj fidis je la gvidaj skipoj de nia amiralŝipo – komencas maltrankviliĝi.

Laŭ-statute decidus la komitato kaj la estraro. Ni esperu, ke ili sukcesos trovi "la" plej taŭgan savan solvon!
E. L.

La vojo (Ludoviko Lazaro ZAMENHOF)

Tra densa mallumo briletas la celo,
al kiu kuraĝe ni iras.

Simile al stelo en nokta ĉielo,
al ni la direkton ĝi diras.

Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,
nek batoj de l' sortoj, nek moko de l' homoj,
ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita
ĝi estas, la voj' elektita.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante,
ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
traboras la monton granitan.

L' espero, l' obstino kaj la pacienco –
jen estas la signoj, per kies potenco
ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
atingos la celon en gloro.

Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,
pri l' tempoj estontaj pensante.
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, –

ni semas kaj semas konstante.

"Ho, ĉesu!" mokante la homoj admonas, –
"Ne ĉesu, ne ĉesu!" en kor' al ni sonas:
"Obstine antaŭen! La nepoj vin benos,
se vi pacience eltenos".

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj
velkantajn foliojn deŝiras,
ni dankas la venton, kaj, repurigitaj,
ni forton pli freŝan akiras.

Ne mortos jam nia bravega anaro,
ĝin jam ne timigos la vento, nek staro,
obstine ĝi paŝas, provita, hardita,
al cel' unufoje signita!

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
traboras la monton granitan.
L' espero, l' obstino kaj la pacienco –
jen estas la signoj, per kies potenco
ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
atingos la celon en gloro.

Poezio el Ljubljana: River-timig-viro

De longe en Ljubljana fraŭlinoj
belegas,
ke Urška plej bela- loĝantoj ne
negas,
de ŝia beleco komuna konsento,
por tio necesas neniu
argumento.
Egale al stelo en frua ĉiel'
ŝi estis elstara el aliaj plej bel'.
De multaj fraŭlinoj, de kelka
virino
okuloj larmiĝis sekrete sen fino,
ĉar plejan al Urška la viroj
dediĉis
inklinon- la maskloj al ŝi ne

sufiĉis.
Se ie en urbo aperis belvir',
ŝi tuj estis preta lin lerte akir'.
Ŝi sciis promesi, ŝi sciis rifuzi,
ŝi estis afabla, kapablis konfuzi
la korojn de knaĉoj, iliajn
gepatrojn,
ŝi kaŭzis korvundojn, dolorajn
cikatrojn.
Ludintan kun viroj longtempe
sen
hont'
atendis kun iu pli forta renkont'.
Sur la urboplaco sub verda tilio,
trumpetoj muzikis dancadis hom'

ĉiu,
dimanĉe tuta junular'
posttagmeze
el tuta Ljubljana dancadis
freneze.
Reĝino de balo- de Urška belec',
sed ŝi ne dancadis pro troa
vantec'.
Petita de multaj ŝi ĉiujn rifuzas
dancadon rezignas- ekskuzojn ŝi
uzas,
dum Urška hezitas, jam sun'
malleviĝas,
mallum' proksimiĝas, jam nokto
fariĝas.

En turo jam batis vespersepa hor'
 tuj kiam ŝin tuŝis dancema humor'.
 Ĉirkaŭrigardanta iun elektanta ekvidas ĉe tablo sidas eleganta junulo, al kiu neniu egalus, en lian brakumon fraŭlinoj enfalus.
 Lin ĉarmi ekstaras aspiro en ŝi, pro tio okulojn ŝi turnas al li.
 Li tion rimarkas, aliĝas al Urŝka, "Ĉu vi volas danci?" kun voĉo li bruska demandis, "Ĉe enfluo de Sava rivero kaj Donava mi aŭdis pri vi, jen mistero, jam Urŝika bela, vin, volas tial, mi, Urŝika bela, inviti al bal'.
 Li tion dirante sin klinas profunde, ridetas la bela knabino aminde, "Ĝis nun mi ne dancis eĉ ne unu paŝon, ĉar vin mi atendis, jen veran malkaŝon.
 Ni dancu ĝis kantos la najtigel' la suno subiras, finiĝas la bal'.

Ŝi prenis la manon de bela junulo,
 rapide ili dancis antaŭ la okuloj de ĉirkaŭstarantaj enviaj virinoj, tiel same se portus ilin la flugiloj.
 Ne estas videbla, ĉu tuŝas la pied'
 la teron simile al kirlo-ŝtormet'.
 Miregas vidantaj ne kredi povantaj
 ĉiuj muzikistoj eĉ ludi ĉesantaj, trumpetoj la voĉon ne plue eldonis,
 per piedoj junulo batante brusonis.
 "Ne ŝatas mi arton de la violon' prefere ke ludu pli sovaĝa son!
 Tuj tuj proksimiĝis la nigraj nebuloj,
 ektondris en ĉielo ekbrilis la fulmoj,
 olrel-surdiganta de ventoj muĝado,
 eksonis de la riveretoj zumado.
 La haroj de ĉiuj ekstaris pro tim' o ho ve, vi Urŝika, povra anim'!
 "Ne timu, mi Urŝka, rapide nur saltu,
 ne timu," li diras "ne timu, ne

haltu
 ne timu riverojn bruege zumantajn,
 ne timu vi ventojn fortege muĝantajn.
 Rapide turniĝu la piedoj en danc',
 rapide, rapide eĉ pli ol la lanc."
 "Oh, nur iomete ni haltu mi kara, por ke mi ripozu, eksterordinara laceco min tedas." "For estas Turkio,
 ni devas nin streĉi, helpas nenio.
 La ondoj vin vokas de Sava river'
 en loko kie elfluas en mi' naskiĝter'."
 Post tio dirita tuj ili rapide pli fore pli fore dancadis senbride,
 sur bord' de Ljublanca turniĝis trifoje,
 dancantaj sin ĵetis en akvon malĝoje.
 Oni povis vidi vorticon en flu' sed la belulinon neniu iam plu.
 Gregor Markic- Factotum
 << Prejŝnja Naslednja >>

Raporteto pri la ĜENERALA MEMBROKUNVENO DE EFE 26-an de septembro 2021 en Stosswihr

Deko da membroj kunvenis por la Ĝenerala Membrokunveno. Dekkvino sendis rajtigilon.

Estis reelektitaj la komitatanoj, kies mandato finiĝis: Grossmann André, Bersweiler Liliane, Herlé Jacques, Stambach Gilbert.

La ĉeestantoj subskribis salutan bildkarton por nia longjara komitatano Roberto KUENY, kiu pro malsano ne povis ĉeesti. Li ne plu rekandidatiĝis.

Eta ŝanĝo okazis en la **estraro**:

Prezidanto: Edmond LUDWIG

Sekretario: Jean-Luc THIBIAS

Kasisto: André GROSSMANN

Libroservo: Jean-Luc Thibias

LA INFORMILO kaj RETEJOJ: André

GROSSMANN

Temoj de la kunveno estis la rutinaĵoj por la funkciado de la asocio kaj la nepra deziro organizi la de du jaroj planitan printempan staĝon apud Nancy.

La kunveno finiĝis pri la estonto de nia admiral-ŝipo UEA. Tio cerbumigis la tutan ĉeestantaron.

Antaŭ la kuna festmanĝo, dum aperitivo, la prezidanto donacis al la longjara kasisto André GROSSMANN etan donacon pro la senhalta laborado por nia asocio ekde multego da jaroj.

Post la kuna manĝo Jean-Luc THIBIAS prezentis la laste aperintajn Esperanto-librojn ricevitajn de la eldonejoj. Sekretariis Jacques HERLE por la verkado de la detala raporto de la kunveno.



**Jen artikolo de Edmond PRIVAT, kiam li estis korespondanto de la svisa gazeto *Le Temps* en Pollando kaj en Aŭstrio-Hungario.
Vues sur le monde Au bord du Rhin
Edmond PRIVAT 16 août 1958**

Une semaine à Mayence au bord du Rhin vous apprend beaucoup de choses: d'abord le grand fleuve est souvent bleu clair au soleil et non pas gris comme on s'y attend, ensuite on peut compter à peu près un bateau-chaland toutes les minutes dans un sens ou dans l'autre, un intense trafic où le pavillon suisse flotte au vent de temps en temps.

Un trafic moins paisible est le cortège assourdissant des camions militaires américains qui pétaradent la nuit sous les fenêtres de l'hôtel et qui ébranlent les palais et les maisons non démolies par la guerre. Il y a partout des ruines et des squelettes de bâtiments. Illustre en Allemagne comme son collègue La Pira en Italie, le maire de Mayence, Franz Stein, est connu pour son activité de reconstruction, en particulier de logements ouvriers.

Comme il parle espéranto (même avec éloquence), il avait organisé, cette année, un grand congrès universel et des conférences universitaires dans cette langue. Une foule bigarrée de plus de deux mille participants de tous les pays du monde, y compris l'Inde et le Japon, transformait en ruche animée le vaste palais rouge des Princes-Électeurs, admirablement restauré.

Avec une seule langue aux voyelles sonores couramment parlée dans les couloirs et les salles de séance bondées, quel contraste avec les sempiternelles traductions et le balbutiement gênant des langues étrangères dans les congrès multilingues! Tout le monde a l'air heureux, s'exprime avec aisance et sans complexe d'infériorité.

On écoute le savant gynécologue japonais Yagi décrire les effets et les suites médicales de la bombe d'Hiroshima et, cette fois, les visages s'assombrissent. On discute les projets de l'UNESCO pour faciliter les échanges culturels entre Orient et Occident, car cette organisation a reconnu les services rendus par l'espéranto dans ce domaine. On entend les nombreux instituteurs qui enseignent l'espéranto dans leurs classes décrire leurs expériences et la joie des enfants qui correspondent avec des écoliers de pays lointains.

Il règne une atmosphère d'unité populaire internationale qu'on ne trouve pas ailleurs à cause des barrières habituelles et l'on se demande comment il se fait qu'un enseignement aussi facile et simple ne soit pas encore généralisé. La raison en est sans doute les préjugés, l'ignorance des faits et le silence de la presse, pour qui l'espéranto n'est plus une nouveauté. L'opinion publique est peu informée de tous les congrès internationaux qui se tiennent en espéranto: de catholiques, de cheminots, de pédagogues, de spécialistes d'une branche ou d'une activité particulière. Le public n'est pas souvent invité non plus à réfléchir sur l'injustice ou les inconvénients qu'il y a toujours à vouloir imposer l'une ou l'autre des grandes langues nationales aux autres peuples au lieu de laisser le choix dans le domaine de la culture et de répandre un idiome neutre pour l'usage international courant.

Le Congrès de Mayence a solennellement honoré la mémoire d'Hector Hodler, fils du grand peintre, qui organisa cet usage en fondant une association universelle avec des délégués-consuls dans chaque ville du monde et un annuaire qui permet de recourir à leur aide en voyage ou pour toute information utile. Cette association se développe de plus en plus.



Edukada projekto de ACM Benino.

Antaŭ pli-malpli du jaroj, Afrika Centro Mondcivitana/ACM Benino ne povis efike agadi en edukado pro manko de subtenintoj kaŭze de la pandemia krizo. ACM ne kapablis ion fari por la geinfolioj kiel antaŭe. Ĝi tamen progresis kaj plu progresas en la instruado de Esperanto.

Ĉi-jare ACM decidis lanĉi alvokon por kolekti lernejaĵojn kaj por subteni lerno-kostojn por 25 lernantoj. Ni bonvenigas lernejaĵojn kaj donacojn cele al la kleriga subtenado por la geinfolioj.

La venonta novlerneja jaro komenciĝos septembre 2021.

Bonvolu viziti nian ret-paĝon por konatiĝi kun niaj aktivaĵoj: www.acmbenin.org , <https://www.facebook.com/citoyenmond/> aŭ <https://www.facebook.com/groups/347708065924001/>

Ni invitas kaj petas de vi ĉiuj subteni niajn agadojn. Lernejaĵojn oni povas sendi al:

Afrika Centro Mondcivitana/ACM Benin, BP 226 Lokossa-Mono, Rep du Benin.

Mon-kontribuo povus esti sendota per UEA-konto de nia kunlaboranto, Nicola Ruggiero (niru-b) retadreso: nicolaruggiero1986@gmail.com aŭ al nia PayPal administranto, Ralf Haumer per

PayPal konto: acmbenin@razokama.de

BP 226 Lokossa-Mono
R p. du B nin
Afrique de l'Ouest.

Skajpo : esperantoawc
www.acmbenin.org

Ni anticipe dankas vin por via kontribuo por kovri la bezonatan sumon 1075 eŭroj (20eŭroj x 25 kaj 23 eŭroj x25). Ĉiu lernanto bezonas 43 eŭrojn por lernejiĝi.

Verkis,
Francois Hounsounou,
prezidanto de ACM Benino.
Cl mentine & Fran ois
HOUNSOUNOU
Rue carri re Akodedjro, No
1.660

Dek-monata Agad-raporto pri la projekto VIEA en Benino.

En oktobro komenciĝis la tria etapo de la projekto "Volontula Instruado de Esperanto en Afriko" (VIEA) en Benino fare de Afrika Centro Mondcivitana (ACM Benino).

Je la fino de la dua etapo, lanĉiĝis la tria. Aubain Cocouvi EKON iĝis la tria volontulo. Li deĵoris en kaj ekster la Centro de ACM Benino. Li instruadis dum dek monatoj kaj faris mirindan laboron: enkonduki kaj instruadi Esperanton en la universitato ST SALOMON kaj aŭdigi Esperanton en la publika universitato "ENSET".

Li instruadis la lingvon dum 8/10 horoj semajne kaj la kursoj ankaŭ okazis en la kvartalo "Agnivedji", en la mez-gradaj lernejoj "La R ussite" kaj "CEG Koudo".

La tria etapo estas subvenciita de Esperanto-info/C line Bernard. Dankon al Paul Dessally kaj Antonio Filho, kiuj ankaŭ finance kontribuis. Entute la tria etapo englutis 800  por pagi la viv-subvencion de la volontulo kaj la pago de skribiloj por la blanka tabulo. Ni tutkore dankas ilin pro la subtenado, kiu helpis nin realigi la trian etapon.

Bonvolu konatiĝi kun la faritaj agadoj per la jena ligilo:

<https://www.facebook.com/groups/347708065924001/>

Apartan dankon al SAT-Amikaro kaj Esperanto-France, kiuj materiale subtenadas la projekton. Virtuala prelego pri la projekto okazis dum la SAT-Amikara kongreso.

La kvara etapo de la projekto komenciĝos oktobre. Ni invitas ĉiujn esperantistojn subteni la realigon de la kvara etapo de la projekto.

Raportis,
Fran ois Hounsounou,
Gvidanto de la projekto VIEA.

LUMINESK

Nova silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio

28.12.2021 - 03.01.2022
Münster / Germanio

LUMINESK' estas la silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto Asocio. Ĝi nun okazos la sesan fojon kaj fariĝis posteulo de la iamaj "Internaciaj Festivaloj" private organizitaj. Ankaŭ ĉi-foje ĝi ofertas varian kaj altkvalitan programon, lingvokurson, prelegojn kaj diskutgrupojn, ekskursojn kaj distrajn programerojn. Partoprenantoj kutime venas el 7-8 landoj.

Luminesk'-kunvenejo estos la junulara domo de Münster, kiu situas apud la lago Aasee meze en la urbo. La domo estas moderna, ĵus plia konstruaĵo estis aldonita. Necesejo kaj duŝo situas en la ĉambro. La nuna domo estis konstruita en la jaro 1992. Sufiĉe apude situas la malnova junulargastejo, kiu havas faman historion en la Esperanto-mondo:



| | ĝis 2021-10-31 | poste* |
|---------------|----------------|-------------|
| kotizo | 460€ | 490€ |

* necesa antaŭpago por validigi la aliĝon: 50 €

La kotizo inkluzivas la restadon de la 28a de decembro 2021 vespere ĝis la 3a de januaro 2022 matene (loĝado en dulita ĉambro, tri manĝoj tage, programo kaj silvestra bufedo).

Unulitaj ĉambroj 140 eŭroj por tuttempaj partoprenantoj **23,33 eŭroj tage**.

La ekskursoj estas pagendaj aparte.

Eblas **partatempa** partopreno je kotizo de **85 eŭroj nokte** (inkl. 3 manĝoj kaj programo).

Tagaj gastoj pagas **50 eŭrojn** (inkl. 3 manĝoj kaj programo).

Atentu: Ĉi-jare Luminesk' daŭras nur ses noktojn, pro organizaj kialoj flanke de la domo.

Pago

Aliĝo ekvalidas per **antaŭpago de 50 €** al jena konto de Germana Esperanto-Asocio:

IBAN: **DE53 5058 1952 0040 1158 42** (Sparkasse Odenwaldkreis) BIC: **HELADEF1ERB**

Pagcelo: Luminesk' 2021 Münster + via nomo

aŭ per UEA-Konto: **geaa-n**.

Bonvolu ĝiri la restsumon ĝustatempe antaŭ la komenco de la aranĝo.

Kontakto: Andreas Diemel

Retpoŝto: demandoj@luminesk.de,

ene de Germanio: 0800 3 36 36 36 64

(senkosta)

internacie +49 203 29 64 877 (fiksreta)

Aliĝilo kaj pliaj informoj ĉe: <https://www.esperanto.de/eo/enhavo/pri-luminesk>

Okaze de bezono, nia kasisto pretas peradi viajn antaŭpagojn kaj pagojn. Bonvolu kontakti lin: andreo.ag16@sfr.fr



Aliĝilo

Mi partoprenos

tuttempe

parttempe de _____ ĝis _____

Mi volas manĝi vegetare vegane

Mi ŝatas dulitan unulitan ĉambron*

Mia nomo aperu en la reta listo de aliĝintoj

Mi antaŭpagos 50€ per

IBAN-ĝirado UEA-Konto

ĝis plej malfrue la _____-an de _____ 2020

Aŭskulteblaj voĉoj en Esperanto. Informas Julia el Frajburgo

En la retpaĝo <http://punkto.info> kuniĝas podkasto kaj aliaj retaj projektoj

Preskaŭ ĉiusemajne aperas nova epizodo de la podkasto kern.punkto pri io ajn en Esperanto, sed ne pri Esperanto. Jen la lastaj temoj:

- KP196 Kalendaroj-La diverseco kaj evoluo de la sistemigo de tempaj cikloj

Pliaj epizodoj vi povas trovi en la arkivo:

<https://kern.punkto.info/arkivo/>

Kelkfoje okazas tujaj elsendoj. Pliaj informoj:

<https://kern.punkto.info/tuje/>

Neregule aperas la epizodoj de la podkasto movada-vid.punkto pri Esperanto-movadaj temoj. Jen la lastaj temoj:

- MvP023 UEA estraro-Interparolo kun du membroj de la novelektita estraro de UEA

Pliaj epizodoj vi povas trovi en la arkivo: <https://movada-vid.punkto.info/arkivo/>

Kelkfoje okazas tujaj elsendoj. Pliaj informoj:

<http://movada-vid.punkto.info/tuje>

Ĝuu la aŭskultadon hejme aŭ survoje.

Amike, Julia.

Ĉina radio profesie reklamas per videoj en Esperanto.

Esperantistoj kreis muzeon por blinduloj

https://tubaro.aperu.net/v/ytb_fNtRrOmPTPs/

<https://www.museoomero.it/eo/muzeo/>

kaj Lucia kuiras !!!

https://tubaro.aperu.net/v/ytb_j4YfxTn8WK8/

<https://globobs.com/>

<https://www.facebook.com/Globobs>

<https://twitter.com/WorldNewsEO>

<https://t.me/EsperantoWorldNews>

<https://www.reddit.com/r/WorldNewsEsperanto/>

<https://globobs.com/top-stories/feed/>

Globobs - Internaciaj kaj lokaj novaĵoj tradukitaj en Esperanton el 250 amaskomunikiloj de pli ol 100 landoj

Kiu estas malantaŭ Globobs?

Hocine REGUIDA, 45-jaraĝa, mi loĝas en Francio.

Mia kariero estas dividita inter IT kaj la humanitara sektoro. Ekde la komenco de 2021 mi laboras pri ĉi tiu ambicia projekto, ideala okazo, kiu kondukis min ekterni Esperanton.

Kial Globobs?

La misio de Globobs estas antaŭenigi interkulturecon kaj malfermitecon de iliaj legantoj donante al ili nefiltritajn informojn por helpi ilin pli bone kompreni la mondon en kiu ni vivas.

Defioj de Globobs

Kreante Globobs, mi aspiras oferti sendependan retejon, kie la libereco de ĉiuj opinioj estos respektata. Kun iom pli ol 100 landoj kovritaj kaj preskaŭ 300 amaskomunikiloj ĉe la lanĉo, la celo de Globobs estas

kovri ĉiujn sentemojn en ĉiuj landoj kaj tiel doni al la leganto la ŝancon vidi la mondon alimaniere. La celo estas ambicia, sed ni kredas je ĝi. Mi ankaŭ aspiras certigi striktan politikon pri protektado de datumoj, evitante dividi viajn datumojn kun publikaj kaj privataj aktoroj. Tial mi elektis apriorie ne fidi je reklamaj enspezoj por financi Globobs. Pro ĉiuj ĉi tiuj kialoj, post la lanĉa periodo, ni ofertas al vi justan abonsistemon. La defioj estas multaj: plibonigi la maŝintradukan sistemon, disvolvi funkciojn, permesante eĉ pli efikan aliron al ĉiuj ĉi tiuj fontoj, validigi daŭrajn kaj justajn partnerecojn kun ĉiuj amaskomunikiloj, ktp. Globobs devas do baziĝi sur ekonomia modelo farebla por atingi ĉi tiujn celojn. Do mi fidus vian subtenon.

Dankon, Hocine REGUIDA
Fondinto de Globobs

La Esperanto-kastelo Greziljono invitas vin al 2 staĝoj en oktobro

2021-okt-19/24 -- Ĥora (korusa) renkonto de *Interkant* kun *Zdravka Bojĉeva*

2021-okt-18/25 -- BEMI-Semajno de esperantlingvaj biciklistoj kun *Olivier Buisson*

2021-okt-18/25 -- Lingvaj ekzercoj por progresantoj kun *Gunter Neue*

2021-okt-25 / nov-03 -- AŬTUNE, la Esperanto-ferioj por infanoj kun *Elisabeth...*

2021-okt-25 / nov-03 -- Esperanto-kursoj kaj aliaj aktivajoj kun *Szilva Szabolcs, Gunter Neue, Maja Mériaux ...*

2021-okt-25 / nov-03 -- Kurso de sorobano (japana abako) kun *Kimie Markarian*



Londona Esperanto-Klubo Jen la prelegoj aŭskulteblaj ĉe jutub-kanaloj

Ĉiu-vendrede vespere okazas la retaj kunvenoj de la Londona Esperanto-Klubo ofte kunlabore kun la Antverpena Grupo. La prelegoj estas registritaj kaj reaŭskuteblaj ĉe jutubaj kanaloj.

Jen rapida aliro ĉe <http://esperanto.france.est.free.fr/> en la rubriko "Prelegoj de la londona klubo"



El nia libroservo

Informoj



⇒ Ĉu la pandemio finfine malaperos? La libroservo reaperos publike tuj kiam revivos niaj komunaj esperanto-aranĝoj! Nun nova serio de libroj de F.E.L.

Ĝis iam!

Jean-Luc Thibias


libroservo.efe@laposte.net



Nove alvenintaj libroj



①



②



③



④



⑤

- 1 **LA MEMORAĴOJ DE JULIA AGRIPINA**, Romano, **Anna Löwenstein**, F.E.L., 2021, 564 p., 20 €. Post "La ŝtona urbo" kaj "Morto de artisto", nova romano de Ana Löwenstein, kies agado situas en la romia tempo. Julia Agripina estas la filino de Germanicus kaj la patrino de imperiestro Nerono.
- 2 **OPUNTIOJ**, Romano, **Carne Mallia**, F.E.L. 2021, 236p., 16 €. La romano baziĝas sur interŝanĝo de 34 leteroj.
- 3 **LA NEKREDEBLA AVENTURO DE MISIO MORESTEN**, Romano, **Eric Bernard Coffinet**, F.E.L., 2020, 122p., 12 €. Kiel estus evoluinta nia mondo se kuglo estus maltrafinta ĉefdukon de Aŭstrio Francisko Ferdinando en 1914?
- 4 **PRAKTIKA FUNDAMENTO DE ESPERANTO**, Prilingvilo, **Petro Desmet**, F.E.L. 2021, 236p., 10 €. La Fundamento, kun difinoj tute en esperanto, kun aldono de komentoj.
- 5 **LA KANTO DE GILGAMEŜ**, Epopeo, **Stéphane Brault**, F.E.L. 2019, 54p., 5,90€. La plej malnova epopeo de la monda literaturo tradukita esperantlingven, 12 tabuloj pri la vivo de Gilgameŝ kaj lia amiko Ediku antaŭ jarmiloj en Mesopotamio, inter la du riveregoj: Tigriso kaj Eŭfrato

Por mendi librojn:

1. Vi sendas vian mendon
 - per poŝto al: Libroservo 37 rue Pierre et Marie Curie FR-54500 VANDOEUVRE (uzante la ĉi-suban mendilon)
 - per ret-poŝto al "libroservo.efe@laposte.net" - nur escepte per telefono: 06-77-90-49-61.
2. Vi baldaŭ ricevos la librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj), pagenda (indikante faktur-numeron) ĉu per:
 - franca ĉeko je "Esperanto France Est" sendita al la supra adreso
 - poŝta ĝiro al "Esperanto France Est" CCP 0 1997 72W NANCY"
 - interbanka ĝiro al "Esperanto France Est" IBAN FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC PSSTFRPPNCY.

| <i>Mendilo</i> | Bonvolu sendi tiujn librojn al apuda adreso: |
|----------------|--|
| S-ro / S-ino | |
| | |
| | |
| En | Subskribo: |

ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2022 ĝis 2024

Nia asocio **Esperanto France-Est** havas la rajton atesti pri ricevataj donacoj aŭ kotizoj, dekalkuleblaj de la impostoj. La principo estas, ke eblas dekalkuli de la impostoj 66% de donaco aŭ kotizo al nia asocio. Tial ni povas proponi al vi kotizon je 20 eŭroj el kiuj 66% povas esti dekalkulitaj de viaj impostoj. Tiam entute vi estos paginta $20 - 66\% = 6,80$ eŭroj, sed nia asocio estos tamen ricevinta 20 eŭrojn. Se vi pagas tian kotizon aŭ pli, nia kasisto sendos al vi ateston, kiun vi povos aldoni al via imposto deklaro.

La atestoj rilatas al pagoj de kotizoj kaj donacoj ricevataj en 2021 (principe ĝis la 31a de decembro) por la imposto-deklaro de 2021.

Bonvolu trovi ĉi-poste la tarifojn por la venontaj 3 jaroj. Ni proponas al vi jam nun, antaŭ la fino de 2021, pagi vian abonon al **La Informilo** laŭ la ĉi-suba tarifo. Ni povas ankaŭ proponi al vi retan version en formato pdf favor-koste kompare kun la papera versio.

Krome vi povas elekti inter la 2 membro-kotizoj por nia asocio, laŭ via situacio rilate al impostoj.

| | | Jaroj: | 2022 | 2023 | 2024 |
|---------------------|--|--|-----------|-----------|-----------|
| | | Abono por la papera versio: | 18 eŭroj | 18 eŭroj | 18 eŭroj |
| | | Abono por reta versio en formato pdf: | 7,5 eŭroj | 7,5 eŭroj | 7,5 eŭroj |
| | | Federacia kotizo: | 7 eŭroj | 7 eŭroj | 7 eŭroj |
| | | Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj: | 20 eŭroj | 20 eŭroj | 20 eŭroj |
| UEA 2022 | MB | • Individua Membro Baza, kun reta aliro aŭ UEA-servoj: reta revuo Esperanto, Delegita Reto (reta jarlibro) | | | 44 eŭroj |
| | MA | • Individua Membro-Abonanto: kun ĉiuj retaj servoj, kiu aldone ricevas la revuon Esperanto papere | | | 74 eŭroj |
| Pag- manieroj | 1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio: <u>Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY</u> Ne forgesu koncize menci la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto: ekzemple: abono Informilo + kotizo 2022 por 1208 | | | | |
| | 2. Per franca bankĉeko aŭ poŝtbankĉeko je la nomo de: <u>Esperanto France-Est</u> sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al ktp por 2022, 2023 | | | | |
| | 3. Per internacia aŭ reta ĝiro je la nomo de <u>Esperanto France-Est</u> kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu menci la celon de via pago kaj vian adres-kodon) | | | | |

Libroj eldonitaj de Esperanto France-Est aŭ akireblaj ĉe nia kasisto

"De Karlis al Carlo Rememoroj"

Kortuŝa rakonto pri la travivaĵoj de Carlo Nicolodi en malfacila periodo de la dua mondmilito, de Latvio al Italio, filo de Esperanto-paro, latva kaj itala.

12 + 4,24 = 16,24 eŭroj

Memorige al Roger Imbert (1938—2009)

Li ne iĝis profeto en sia lando (Francio) sed eminenta esperantisto en Zagrebo (<kroatio)

4+2,12=6,12 eŭroj

Paul-Georges KOCH (1908 - 1982)

Eta selekto de poemoj tradukitaj el la germana fare de E.Ludwig

1,50 + 2,12 = 3,62 eŭroj

Knabaj petolaĵoj Poemoj de Gérard LESER en la alzaca,

tradukitaj al Esperanto de E. Ludwig

1,50 + 2,12 = 3,62 eŭroj

La har-plektaĵo de Sylvie Reff Poemoj en alzaca

kun traduko al Esperanto de E. Ludwig

1,50 + 2,12 = 3,62 eŭroj

Etaj rakontoj pri al Katedralo de Strasburgo

Ĝin verkis kaj kompilis Sûzel PAILHES. Ĝi aperis en 12 lingvoj. En la Esperanto-versio

ankaŭ aperas la hispana kaj la rusa lingvoj, 48-paĝa libro kun tre solida kovril-paĝo

12 + 8 = 20 eŭroj

"Gardu vin, knabo!" Historiaj rememoroj de Armand Hubert dum la dua mondmilito.


1 + 2,12 = 3,12 eŭroj

Konstruado-kajero de TAKE 2021

La ĉi-jara temo estas "Akvoj" kun 14 arikoloj de diversaj aŭtoroj

9 + 4,24 = 13,24 eŭroj

Ni lernu per enigmo kaj humuraĵoj



G.J.

La loĝejo de tiu viro estis priŝtelita nokte. Iom poste la polico informas lin, ke la ŝelisto estis ĵus kaptita.

Tiam la viro petas permeson alparoli la ŝteliston.

"Kion vi deziras peti de li?"

- Jes, sinjoro inspektoro, komprenu. . . Li eniris mian domon je la dua matene sen vekti mian edzinon! Li klarigu al mi, kiamaniere li sukcesis tion fari, tiam mi volonte nuligos mian plendon."



Virino eniras aŭtobuson kaj iom ŝancelante alparolas sidantan pasaĝeron.

"Ĉu vi bonvolas lasi al mi vian sidlokon, mi estas graveda.

- Memkomprenble sinjorino, bonvolu!"

Li ekstaras permesante al ŝi eksidi. Tiam li ankoraŭ scivolemas kaj demandas:

"Sed ne eblas rimarki vian gravedecon. . . De kiom da tempo vi spertas tion?"

- De dek minutoj. . . sed tio preskaŭ svenigis min!"

En muzeo pri egipta arto, vizitanto flustras al sia edzino. . .

"Kelkajn el tiuj hieroglifoj mi sukcesas iom kompreni.

Iuj elvokas la vivon de la faraonoj, la daŭran de la regado, la sintenadon de la edzinoj kaj de la gefiloj. . .

Tamen mi ne sukcesas trovi la piktogramon, kiu indikus la necesejon!"

Trejniĝantaj soldatoj babilas:

"Kial vi elektis tiun profesion milit-servon?"

- Ĉar mi ja estas fraŭlo kaj ŝatas travivi danĝerajn aventurojn. . . eĉ militon. . . Kaj vi?"

- Ĉar mi estas edzo kaj ege ŝatas pacon!"

HORIZONTALE

1. Scienc' pri malnovaĵoj.
2. Restaj' de disfalinta konstruaĵo. Animal' en birdkorto.
3. Arta doktrin' en Eŭropo dum la 17a jarcento.
4. Sudeŭropa insula ŝtat' en Mediteraneo. Koro de petalo.
5. Tuko sen vokaloj. Pronomo. Prepozicio.
6. Seksa impuls'. Odora floret'.
7. Maldika korpa vaskul'.
8. INVERSE: vestaj', kiu protektas la manon. Optika aparat' por observi malproksimajn objektojn.
9. Rezult' de la kombinado de oksigeno kun malpli elektronegativa elemento. INV: refaldita sekci' de ŝtofo.

VERTIKALE

1. Fakulo pri konstruado.
2. Cilindra forma objekt'. Fera pec' kiu konektas la pedalojn kun akso.
3. Demanda pronomo. INV: malmola substanc' uzata por lavpurigi.
4. Fari ke iu eniras per subita moviĝo.
5. Pronomo.
6. Dolĉa likv'. Malaltiĝo en tereno.
7. Pronomo. Bird' kun diketa beko kaj ruĝa brusto.
8. Stomako (en kunmetaĵoj). Rare sen vokaloj.
9. Membro de ekstrema ŝijaisma islamo.

En aŭtobuso iu mense malsanulo aĉetas ĉiu-matene du biletojn ĉiam por la sama itinero. La kontrolisto, iom scivoleme deziras scii:

"Nu, io iom strangas. . . Kial vi aĉetas ĉiu-matene du biletojn? Unu sufiĉus!"

- Unu bileton mi metas en mian dekstran poŝon kaj la alian en la maldestran. . . Se mi hazarde perdus unu, tiam mi havas ankoraŭ la duan!

- Sed se vi perdus ambaŭ?

- Ne gravas, mi havas ankaŭ abon-karton. . . "

Jen, iu urbano, pro profesia deĵoro, devis transloĝiĝi kaj nun loĝas en nova domo en la vilaĝo. Por ĉiumatene ŝpari tempon, li petas sian najbaron, kamparanon, :

"Estimata Sinjoro Jozefo, ĉu vi permesas, ke mi trairu vian kampon sur kiu paŝtiĝas via bovinaro, por pli rapide atingi la bus-haltejon je la sepa matene?"

- Komprenable!. . . sed se la virbovo ekvidas vin, vi eĉ sukcesos kapti tiun de la sesa kaj duono!"

SOLVO KVE 194:

Horizontale: 1.KALM. FEROL. 2.SKUAL. NORI. 3. ESTRAGON. 4.REE. ŜARĜIT. 5.OLOK. SMUTO. 6. GO. METALA. 7.RO. OKA. 8.ARKAISM. OP. 9.FIUL. UO. 10.IMPERFEKTO.

Vertikale: 1.KSEROGRAFI. 2.AKSELO. RIM. 3. LUTEO. OKUP. 4.MAR. KM. ALE. 5.LAŜ. ERI. 6. GASTOS. 7.ENORMA. MUE. 8.RONĜULO. OK. 9.OR. ITAKO. 10.LIST. APRO

La juna Alano forlasas la lemejon fine de la posttagmezo kaj rehejmiĝas kun stranga mieno. Lia patrino deziras scii, kio turmentas lin.

"Nu, panjo, nia instruistino demandas al ni ĉiumatene, kion ni manĝis en la antaŭa vespero. . . Mi respondas, ke mi kutimas ricevi lakton kun du pan-pecoj ŝmiritaj je butero. . . Ŝi iom miras pri tio. . .".

La patrino iom cerbumas kaj proponas:

"Morgaŭ vi diros al ŝi, ke ni vespermanĝis volovanetojn kun maraj bestoj kaj nudelojn"

Alano tre kontentas kaj je la sama demando farita de la instruistino li fiere respondas

"volovanetojn kun maraj bestoj kaj nudelojn"

- Gratulon! Ĉu tio vere bongustis! Ĉu vi multe da ĝi manĝis?

-Du bovlojn!"

Du amikoj renkontiĝas post la ferio-tempo

"Nu, kie vi pasigis tiujn du semajnojn?-La unuan mi estis en Alpoj. . . kaj la duan en gipso! "

SinJORINO ĉe la kuracisto:

"Estimata Doktoro, petas la pacientino, kiu jam tute senvestiĝis, diru al mi sincere. . . Rigardu min, kion vi opinias?"

- Hem. . . fakte vi ne plu devus uzi tiun aĉan ŝmirajon. Due, vi aspektus pli alloga, se vi perdus kvin kilogramojn, kaj kaj trie, nepre surhavu okulvitrojn, la kuracisto loĝas ĉe la supra etaĝo, mi estas ja asekuristo!"

Tri viroj staras malpacience sub abunda pluvo antaŭ telefon-budo okupata de juna virino.

"Ŝi eniris antaŭ dek minutoj, klarigas unu al la du aliaj, kaj ŝi ne ĉesas babili!"

lom poste ekkoleras unu viro:

"Vidu, nekredeble!. . . ŝi eĉ uzas sian propran poŝtelefonon! "

Tipoj de kongresanoj - jam antaŭ pli ol cent jaroj

Ĉi tiun priskribon de diversaj tipoj de partoprenantoj de Universalaj Kongresoj estis unue trovitaj en la raporto de *Esperanta Finnlando* pri la 14-a UK en Helsinko (1922), kun iom nepreciza font-indiko. Min konsternis, ke la bone rekoneblaj tipoj estis observeblaj jam tiam. Sed danke al Harri Laine, mi trovis la originalan tekston en la raporto pri la 8-a UK en Krakovo (1912), do preskaŭ nekredeble frue! La aŭtoro estas Ned Katryn – la *Enciklopedio de Esperanto* scias lian veran familian nomon sed ne la personan: "Lefebvre (ps. Ned Katryn), franco, estis kapitano en Versailles antaŭ la milito. Artikoloj en L[ingvo] I [internacia], tre interesaj estis liaj humorplenaj raportoj pri UK-j." Montriĝis ankaŭ, ke en *Esperanta Finnlando* (aŭ en iu intera versio) oni senaverte ŝanĝetis la tekston, kiu estas pli bona en la originala versio.

Oni povas nur miri, kiel rapide la socia movado por Esperanto naskis ankaŭ Esperantujon, propran komunumon kun siaj internaj roloj. Ĉi tie vere temas pri frua kongreso nur sep jarojn post la unua kongreso en Bulonjo ĉe Maro!



Sro Essigmann, polo, Klara Zamenhof, kantistino Essigmann, fraŭlino kaj ges-roj Legrand

La Akceptejo estas nun plena, plenega de la tuta kongresanaro, kiu zumas, bruas, bruegas. Ĉie babilantoj, en la ĉambroj, en la koridoro, sur la ŝtuparo, en la ĝardeno. Ne estas la Turo Babela, sed la Turo Babila. Kaj sur ĉiuj vizaĝoj brilas la ĝojo trovi amikojn ne reviditajn de unu jaro, de du jaroj, eĉ kelkafoje de la Bulonja Kongreso. Kaj oni salutas malnovajn konatojn, oni konatiĝas kun novaj samideanoj, tre multenombraj en tiu ĉi Kongreso.

Kaj sidanta sur benketo en angulo mi rigardas, pasantaj kaj repasantaj, la diversajn tipojn de kongresanoj, kiujn oni renkontas en ĉiuj niaj jaraj kunvenoj.—Jen kelkaj el ili:

La verda kongresano, esperante vestita, kun verdaj steloj sur la ĉapela rubando, verdaj steloj sur la poŝoj de l' jaketo, verdaj steloj sur la tuta veŝto. Li havas verdajn flagetojn sur la ĉapelo, verdajn flagetojn en ĉiuj butonruoj de la jaketo; li purigas sian nazon (abomeno!) per malgranda esperanta flago. Ĝenerale li estas vegetarano kaj manĝas nur verdajn legomojn.

La bonhumora kongresano, ĉiam ridanta, ĉiam kontenta. Li venis al la Kongreso por amuziĝo, kaj li amuziĝas. Li ĝojas, kiam brilas suno, li ankaŭ ĝojas, kiam falas pluvo. Li gratulas ĉiun, aplaŭdas post ĉiuj paroladoj, havas ĉiam saman opinion, kiel lia kunparolanto. Li estas kontenta pri la manĝo, kontenta pri la ĉambro, kontenta pri la puloj (ĉar ekzistas ankaŭ kongresaj puloj).

La malbonhumora kongresano, ĉiam malgaja, ĉiam kritikanta. Tuj de la alveno li kritikis kaj plendas. La donitan loĝejon li trovas abomena, li postulas tuj alian. Kiam la ŝanĝo estas farita, li sopiras je la unua. En la kunvenoj li plendas, tial ke lia sidloko estas tro malproksima, ke la oratoroj tro mallaŭte parolas. Se la parolado estas longa, li plendas, tial ke oni diras neutilajn vortojn; se la parolado estas mallonga, li plendas, tial ke la oratoro petis parolon por nenion diri. Ĉiam kaj ĉie la malbonhumora kongresano malfermas la buŝon nur por diri malagrablajn. Kaj la lastan tagon li malaperas murmurante, kritikante la faritan elekton pri la sidejo de la venonta kongreso.

La politika kongresano, kiu revas nur pri parlamento, partioj, proponoj, k. t. p. Li portas ĉiam sub la brako grandan paperujon kun dokumentoj, projektoj, broŝuroj. Li alkondukas vin en angulon por malkovrigi al vi grandan sekreton. Li estas aŭtoro de vasta projekto por organizado de Esperantistaro. Ĝis nun oni parolis nur pri Tera Esperantistaro; sed oni scias, ke kredeble oni povos baldaŭ interrilatiĝi kun aliaj planedoj. Tiutempe la propagando estos ne sole nacia, ne sole internacia, sed ankaŭ interplaneda. Oni do devas nun pensi pri la kreado de centra organizo,

por la tuta suna sistemo. Tiu ĉi centra organizo bezonas oficejon, sekretariejon. Sed ekzistas jam tute preta oficejo, la Centra Oficejo, kiu plene konvenas por la rolo de Sunsisistema Oficejo, pro la multaj aŭtobusoj pasantaj antaŭ la pordo.

La mallaborema kongresano, kiu venis al la kongreso por ripozi kaj... ripozadas. Li leviĝas tre malfrue, bone ĝuas la matenmanĝon, kaj ĉirkaŭ la dekunua iras al la Akceptejo. Li babilas en la koridoroj, skribas kelkajn poŝtkartojn kaj je la unua iras por tagmanĝi kun samideanoj. Li longe babilas, trinkas nigran kafon kaj je la tria akompanas amikojn ĝis la pordo de l' kongresejo. Kelkafoje li eniras la vestiblon por fini babiladon. Li unufoje eĉ malsupreniris la ŝtuparon kaj rigardis scivole tra la pordo en la kongresan salonon. Sed la severaj mienoj de la estradaj sinjoroj lin timigis kaj li tuj malaperis. Dum la kunvenoj li promenas tra la urbo, aŭ, sidanta en publika ĝardeno, legas nacian gazeton. Li konas ĉiujn kafejojn aŭ sukeraĵejojn de la kongresa urbo, japanajn kaj ne japanajn, sed havas nenian ideon pri oficialaj institucioj.

La ĝenerala specialisto, ano de ĉiuj societoj, ligoj aŭ asocioj. Li ĉiam kuras kun programo en mano, ŝvitante kaj viŝante la frunton. Li ĉagreniĝas, tial ke okazas samtempe kunvenoj de katolikoj kaj liberpensuloj, bankistoj kaj socialistoj, farmaciistoj kaj juristoj. Li estas en stranga embaraso; ĉu li estas pli socialisto ol bankisto aŭ pli bankisto ol socialisto. Ne trovante solvon de l' problemo, li eniras la kunvenon de maristoj (li neniam vidis maron), kie oni lin enskribas en la Societon de la Amikoj de la Maro.

La kolektista kongresano, kiu kolektas ĉiujn librojn, ĉiujn paperojn, ĉiujn afiŝojn rilatantajn Esperanton. Li abonis ĉiujn Esperantajn gazetojn aperintajn kaj malaperintajn. Li havas la solan konatan ekzempleron de la Groenlanda Esperantisto, presita ĉe la Norda Poluso mem sur foka haŭto. Li posedas ankaŭ la bonan eldonon de la verkaro de Devjatnin, tre maloftan, tiun, kiu

enhavas multe da preseraroj en la Antaŭparolo. En ĉi tiu momento li estas tute ĉagrena; li vidis en la mano de samideano prospekton pri iu Esperanta botpoluro, kiu mankas en lia kolekto kaj li nenie povas ĝin trovi. Li petas la malofaĵon de ĉiu oficisto, de ĉiu vendisto, kaj fine, ho feliĉo! sur la strato li ĵus ekvidas unu iom makulitan de koto. Zorge li ĝin prenas, stampas per sia marko kaj enskribas en la katalogon kun numero 364523.

La kongresano, kiu elpensis novan vorton, terura viro, kiu vin prenas per butono de jaketo, vin puŝas en angulon de koridoro, kaj ne volas vin liberigi. Vane vi konstante jesas, vane vi oscedas, vane vi rigardas la poŝhorloĝon. Li daŭrigas malvarme la pruvadon. Esperanto estas perfekta, per ĝi oni povas esprimi ĉiujn nuancojn de l' penso krom unu; Esperanto havas ĉiujn kvalitojn, ĝi estas logika escepte pri unu punkto. Kelkafoje la kongresano, kiu elpensis novan vorton, kaptas alian elpensinton. En tia okazo ambaŭ parolas samtempe ne aŭskultante unu la alian.

La kongresano, kiu scias nenion pri Esperanto, krom la nomon Esperanto.


Vi ridas, vi diras, ke mi estas ŝerculo, mensogulo. Mi ĵuras, ke ĉi tiu speco ekzistas. Mi vidis la solan

ekzempleron ĝis nun konatan per miaj propraj okuloj. Li havas du kruojn, du brakojn, du okulojn kaj unu buŝon, el kiu neniam eliris iu ajn esperanta vorto.

La dirita kongresano kutimas dum sia libertempo ĉeesti ian ajn kongreson por amuziĝo. Li legis en la gazetoj pri la Krakova Kongreso kaj tuj aliĝis. Li alvenis Krakovon kaj estis tute mirigata. En ĉiuj aliaj kongresoj oni parolis diversajn lingvojn kaj li povis kompreni la paroladojn faritajn en sia propra gepatra lingvo. Nun en ĉi tiu esperanta kongreso li povas nenion kompreni, ĉar ĉiuj parolas la saman lingvon, tute nekonatan de li. Kia ridinda kongreso! Li pensis, ke oni faros paroladojn por klarigi, kio estas Esperanto. Sed tute ne, oni nenion klarigas, oni nur uzas la lingvon. Kia stranga kongreso!... Kelkaj samideanoj donas al li ŝlosilon. Li legas la frazon pri artikolo, kritikas la unuecon de ĉi tiu, kritikas kelkajn radikojn de la vortaro, deklaras, ke al Esperanto ĉiam mankos literaturo, kaj malaperas, ĵurante, ke neniam li ĉeestos denove esperantan kongreson.

El la blogo „Lingva Tereno“ de Jouko Lindstedt

Mia trezoro



Kun helpo de mia filo Jan mi kreis la hejmpaĝon 'mia trezoro'. Estas mia eta kontribuo por Esperantujo. Mi kolektis diversajn materialojn, plej ofte memfaritaj kaj en la germana kaj en Esperanta lingvo. Vi tie trovas ekz. miajn e-librojn, kanto-tekstojn kaj eĉ dosierojn kun muziko kaj bildoj.

Lasu min iomete priskribi gravajn partojn de la enhavo.

Sur la subpaĝo 'La Ora Testudo' ankaŭ troviĝas projekto, kiun mi lanĉis je la komenco de mia Esperanto-'kariero'. Verdire mi mem ne verkis tiun fabelon. Estis la juna aŭtorino Katharina von Radziewsky kiu skribis tiun rakonton en la germana lingvo en junio 2003. Mia esperantlingva versio estis la bazo por multaj kromaj tradukoj. Tiel evoluis tiu vere internacia projekto. Mia filo Kay desegnis la bildojn, kaj 30 gesamideanoj el la tuta mondo tradukis la tekston.

La ĉefpaĝo prezentas la projekton "**Unu lerneja leciono pri Esperanto!**" kaj "**Unu horo pri Esperanto por infanĝardenoj kaj antaŭlernejoj**". Kunlaborante kun Lu von Wunsch-Rolshoven (esperantoland.org) kaj Jürgen Wulff (esperanto-hamburg.de) mi skribis la du broŝurojn. Uzu la diverslingvajn versiojn por la internacia disvastigado de la koncepto!



Dediĉe al la Tago de urbo Samarkando 2021

LA INTERNACIAJ LETER-TAGOJ

“VORTO PRI SAMARKANDO: LA URBO, PRI KIU ONI ŜATAS PENSI, SONGI KAJ PAROLI”

Karaj amikoj, samideanoj, kolegoj, samteranoj,

Baldaŭ denove venos la signifoplena dato kaj festa okazaĵo por la urbo, pri kiu multaj loĝantoj de nia planedo ŝatas pensi, memori, revi kaj paroli. La 18-a de oktobro – la Tago de Samarkando. La evento celas refokusigi nian rigardon je alloga unika aromo kaj arkitektura dekoro de la urbo, listigita en la registro de Monda Heredaĵo de Unesko.

Tradicie, estas invitataj kontribui ĉiuj, por kiuj Samarkando estas pli ol nura urbo. Por kiuj ĝi estas vivanta memoro, emociplena historio, signifa malkovro, amdeklaro, rendezuejo kaj eĉ sorto. Ĉiuj, kiuj persone spertis la mirindaĵojn de Samarkando en realo, ĉu de malproksime, ĉu estinte tuj apude aŭ eĉ nur en siaj pensoj aŭ sonĝoj, konservis neforviŝeblajn impresojn pri la grandioza historia heredaĵo kaj neordinara nuntempa kulturo de la mondfama urbo.

Ĉiujare venas la Tago, kiam ni esperas, ke, almenaŭ por momento, vi transformos viajn pensojn kaj sentojn en ion kreivan la fundo de via animo esprimi – naskitajn fare de via koro kaj enstampiĝintajn en via menso – rememorojn pri tiu ĉi speciala loko. Tio estas eblo por dividi viajn travivaĵojn kaj sentojn, por konigi viajn specialajn spertojn kaj tra tiu ĉi transdono denove fari Samarkandon rendezuejo por homoj kaj kulturoj, tradicioj kaj novigoj, por Oriento kaj Okcidento, Sudo kaj Nordo. Ĉiam tiel estis en la pasinteco kaj estu tiel ankaŭ en la estonteco!

por iuj, ununura vorto sufiĉos por esprimi la vizion pri Samarkando; iuj skribos personan leteron al “Romo de l’Oriento” aŭ verkos saluton forme de poemo, kanto, muziko, desegnaĵo, foto ktp; aŭ proze komunikos siajn revojn aŭ bondezirojn por la estonteco de la urbo... Kompreneble, ĉio dirota kaj verkota pliproksimigos nin unu al la alia, unuigos nin la eternaj valoroj, pliigos niajn konojn, evoluigos spertojn, plifortigos pacon kaj harmonion – ĉion, kio ebligis al Samarkando atingi la majestecon kaj por ĉiam eniri la historion.

voĉo gravas! Bonvolu sendi viajn reeĥojn, gratulmesaĝojn kaj alispecajn tiutemajn kontribuojn plejeble baldaŭ, laŭeble, ĝis la 1-a de oktobro 2021 al imps86@yahoo.com, kvankam la materialoj iutempe estos akceptataj ankaŭ post tiu ĉi

interesaj kontribuadoj estos publikigitaj en nialanda gazetararo kaj en la venonta eldono de “Konciza Enciklopedio de Eksterlanda Samarkandiana: Kulturo Unuiganta la Mondon”. ĈIU ricevita mesaĝo estos danke agnoskita kaj la raporto pri la estos sendita al ĈIUJ partoprenantoj.

Atendante vian baldaŭan reeĥon, ni antaŭdankas pro via eventuala helpo kaj kunlaboro.

al vi kaj bonfarton, pacon kaj harmonion, vivooptimismon kaj bonhumoron, feliĉon kaj bonŝancon!

Sunplenajn bondezirojn el 2760-jara Samarkando,

Bonvolu plusendi tiun ĉi anoncmesaĝon al viaj kolegoj kaj amikoj, al ĉiuj, kiuj eble trovos la temon interesa. Dankon!

| |
|---|
| Anatolij Ionesov, fondinto kaj prizorganto Enciklopedia projekto “Samarkandiana” Box 76, UZ-140100 Samarkando Uzbekio Retpoŝto: imps86@yahoo.com |
|---|

La 7-a Esperanto-staĝo en Métabief de la 15.08 ĝis la 21.08. 2021

La staĝo estis organizita same kiel en lasta jaro de la klubo "Esperanto Chalonnais" sub la gvidado de Anne-Marie Ferrier. Ĝi okazis meze de aŭgusto 2021 en la vilaĝo Métabief. Ĉar la koron-virusa pandemio daŭris kun pli rigoraj kondiĉoj, la partoprenantoj devis havi san-atestilon por havi permeson partopreni la aranĝon.

Kunvenis 25 geesperantistoj, plejparte francoj el diversaj regionoj kaj unu geedza paro el Svislando. Bona ideo estis, ke ĉiu alportu ion el sia regiono. Do, dum la kafo-paŭzoj ni povis ĝui diversajn frandaĵojn kaj aperitive ni gustumis plurajn sortimentojn de vinoj kaj fromaĝoj. Bongustis ankaŭ prunoj el nia ĝardeno. Ĉiutage ni bone kaj ĝissate manĝis.

Ŝatas. Kiu parolis pri kio: Max donis al ni pikardan recepton. Paŭlo prezentis al ni la metodon por krei ĉampanon. Belege! Ĉefe, ke li alportis ĉion (t.e. ĉampanon kaj roz-kolorajn biskvitojn el "Reims") por ke ĉiuj profitu bonegan aperitivan! Thérèse parolis al ni pri sia infaneco rolante kiel "fratino Paŭlino". Christian rakontis al ni kiamaniere li transformis simplan urban ĝardenon en frukto-donan legom-ĝardenon. Ni nomis la diversajn ilojn, la legomojn ktp. Tre kortuŝa priskribo de "Constantine" el Alĝerio faris Jeanine helpate de Josiane. Ili vojaĝigis nin en aparta etoso. Unu rakontis, la alia desegnis la mapon de "La Roko" kun la pontoj ktp. Isabelle klarigis al ni, kial "Paray-Le-Morial" estas vojo al paradizo. Ŝi parolis al ni pri "Notre-Dame de



Kiel kutime, matene kaj antaŭ la vespermanĝoj okazis Esperanto-kursoj. Michel Dechy instruis ĉefe pere de bild-rakontoj, bildoj kaj gazet-artikoloj. La lernantoj ŝatis roli en la aventuroj de Tinĉjo en Tibeto, la preferata albumo de Hergé mem. Li ankaŭ prezentis Esperanton en VTF (Vilaĝo, Turismo, Familio) antaŭ dudeko da gejunuloj kaj gepatroj. Ankaŭ pluraj esperantistoj ĉeestis la prelegon. La unuan vesperon li prezentis la verkon de Hergé, serion de 24 albumoj de la Aventuroj de Tinĉjo kaj Miluĉjo.

Jacqueline Poux instruis aparte al du virinoj, kiuj jam havis bazajn sciojn pri la lingvo, sed kiuj deziris perfektigi pri Esperanto.

La konversacian Esperanto-kurson gvidis Catherine Kremer. Ŝi mem priskribis la manieron prezenti sian kurson:

Mi zorgis pri la kurso B. Mia rolo estis paroligi la partoprenantojn. En mia grupo ok interesatoj ĉeestis. Paroligi homojn ne ĉiam estas facile. La unuan tagon ni prezentis nin: kiu mi estas, de kie mi venas, kion mi ŝatas fari (hobiojn), kio estas mia profesio... Tre rapide la homoj interparolis. Mi tutsimple petis, ke ili prezentu al ni temon, kiun ili plej

Romay". Jean-Paul rakontis pri sia unua renkonto kun Esperanto. Bernard intervenis por paroli pri la projekto "Common Voice". Floreal kaj Liba alvenis iom pli poste. Liba kiel kutime fotis kaj Floreal fariĝis nia kontrolisto pri la bona uzo de kelkaj vortoj – ni ne plu bezonis vortaron! Mi vere dankas al la tuta grupo! Mi denove multe lernis dank'al ĉiuj kaj en agrabla etoso.

Post la tagmanĝo okazis pied-migradoj en la montaro Ĵuraso, vizitoj al la kastelo La Château de Joux, al mueleja muzeo, de distilejo en Pontarlier kun gustumado, de ekspozicio pri fabrikado de fromaĝoj kaj veturado per turisma trajno.

Vespere ni ludis tablo-ludojn kaj dancis. Dieter Rooke rememorigis la 100-jariĝon de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) kaj Martine Demouy prezentis bildojn kaj rakontis pri vizito al la regiono de Fukuŝima kaj montris la domon de esperantistoj Jacugatake.

Ĉiuj estis kontentaj kaj tre feliĉaj povinte denove renkontiĝi kaj ĝui agrablan semajnon en tiu montara loko de ĵurasa regiono. Dankon al la organizantoj!

Nokte, trajne tra Aŭstrio al Itala kongreso en Asizo

Rakontas Yoshie kaj Dieter Kleemann

La Itala Kongreso en Asizo 2021

La 19 an de aŭgusto 2021 je la 20a10 ni ekveturis de la Munkena ĉefstacidomo al Asizo. Ni estis triope. Nia amikino el Ulm – Emma-planis tiun trajn-vojaĝon.

Nia nokta trajno estas por 4 personoj en unu kupeo. Pro la korona regularo oni uzas ĝin nur por 2 personoj! Sed tamen tiu kabino estis tuj plena pro niaj 2 malgrandaj valizoj kaj 2 dorso-sakoj. Ni metis niajn ŝuojn sub la suban liton. Nia trajno apartenas al la Aŭstra Fervojo.

Pro la monotona kaj samsona tono ni povis facile endormiĝi.

Kiam ni estis denove vekaj ni vidis tra la fenestro nigran horizonton kun ruĝaj strioj de la matena suno. . . Estis la 5-a horo matene. Nia trajno devis atingi la stacidomon de Florenco sed pro grandaj ripar-devoj de la reloj ni haltis en la stacidomo de Bologno je la 6a10 matene. Finfine ni alvenis al nia unua celo Florenco je la 7a14. Ni havis unu horon da atendado por pluveturi al Asizo je la 8a10.

Ĉe la enirejo al la kajo la kontrolo de koronvaccino estis tre severa. Intertempe nia grupo grandiĝis al kvin. Ni finfine atingis la stacidomon de Asizo je la 10a41 Jam la suno radiis super nia kapo kun varmegaj radioj. Nia kongresejo situas ne malproksime de la stacidomo. Ni marŝis ĉa. 10 minutojn sur nekonata vojo. La aŭtotrafiko ne multe ĝenis nin. En la kongresejo ni tuj renkontis malnovajn amikojn.

Asizo, en la koro de Umbrio, je la mezo de la deklivo de Monto Subasio (424 m alta) estas hodiaŭ turisma centro. Ĉie ajn en la urbo estas memoraĵoj de la ordeno de Franciskanoj. En la centro de la urbo okulfrappe staras la Baziliko de St. Francisko (grava por la belarta historio de Eŭropo). La internaj muroj de la Baziliko estas plenaj de mul-tkoloraj pentraĵoj de famaj pentristoj, kiel Cimabue, Giotto kaj Pietro Lorenzetti.


Asizo estas la naskiĝloko de la Franciskana Ordeno, kiu ekde la mezepoko disvastiĝis kiel Franciskana movado en la mondo. La bazilika tutaĵo konsistas el du surmetitaj preĝejoj- la suba (1228- 1230) kaj la supra (1230-1253) kaj subtere unu kriptotrova en

la jaro 1812, kie kuŝas la tombo de la Sanktulo Francisko.

La belegaj freskoj de la 3-a kaj 4-a jarcento estas mirindaj trezoroj de tiu frua epoko.

Krome ornamas la mur-bildoj de Cimabue, Giotto kaj aliaj, kiujn vizitantoj ĝuas en la malhela lumo.

En la navo de la supra baziliko videblas ciklo de freskoj de Giotto, kiuj prirakontas la vivon de Sankta Francisko. Ekstere sur la fasado de la Baziliko oni trovas belegan gotik-stilan rozeton influitan de franca arto.



En decembro 2000 okazis la oficiala enskribo de Asizo (baziliko kaj aliaj Franciskanaj objektoj) en la liston de bonhavaĵoj de UNESKO.

Dum la kongreso abundis tre interesaj ekskursoj tuttagaj kaj duontagaj.

Perugia kaj Torgiano, Gubbio, Lago Trasimeno. Ekskurso al Spello Akvofalo de marmoro kaj Narni Todi kaj Orvieto Montefalco La vojo de Safrantino, Ekskurso al Foligno (la unua itala presejo, kie estis eldonita la unua La Dia Komedio – presisto Orfeni, kiu estis disĉiplo de Gutenberg!) Tiamaniere ni povis konatiĝi kun la kulturoj de la epokoj de la Etruskoj, Umbroj, tempo de Romianoj kaj Langobardoj kun diversaj religioj.

Krome en la kongresejo okazis multaj prelegoj – ekz. Pri la Dia Komedio de Dante Alighieri okaze de la 700-jara datreveno de lia morto. Tiamaniere ni riĉigis nian scion pri tiu regiono Umbro.

Denove ni estis en la trajno al la direkto de Munkeno.

Survoje ni havis la ŝancon restadi unu tagon en Florenco. Tio estis la lasta “KUKO” de nia vojaĝo sur la ponto Vecchio (flanke ni manĝis glaciaĵon kun varma kafo).

Durmshheim, la 11 an de septembro 2021
Yoshie kaj Dieter Kleemann



Tiu kongreso estis jam planita por aŭgusto 2020, sed pro la pandemio, ĝi povis okazi nur virtuale. Pro tio la organizantoj aparte ĝojis povi ĝin okazigi ĉi-jare en reala formo, malgraŭ pluraj malfacilaĵoj kaj komplikaĵoj por respekti la sanajn regularojn.

Aliĝis al tiu kongreso pli ol 200 samideanoj plejparte el diversaj landoj de Eŭropo. Tamen ŝajne nur 128 povis efektive ĝin partopreni. Supozeble pro la nunaj cirkonstancoj iuj ne sukcesis alveturi al Italio.

La ĉefa temo ja iel rilatis al Sankta Francisko de Asizo kaj lia prediko al la birdoj. Kiun oni povas kompreni kiel "Komunikado inter malsamuloj kiel vojo al paco".

Du ĉefaj seminarioj estis proponitaj:

Duncan Charters celis reliefigi la interkulturan kompetenton, traktante kvar apartajn subtemojn, kun mallonga enkonduko kaj sekva interaga tempo kun demandoj, komentoj, intervenoj de la publiko.

1 *Interpersona komunikado: kiel tion faciligi kaj eviti konfliktojn.*

2 *Kiel komuniki al aliaj pri Esperanto kaj kion eviti.*

3 *Interkultura kompetento kaj komunikado: kion ni bezonas?*

Tio igis la aranĝon pli interesa kaj partopreniga por la ĉeestantoj, do vere seminaria stilo kaj ne nur prelego. En la unua estos iom pli longa enkonduka prezentaĵo, kaj por la aliaj la grupo havos taskojn por prilaboro en grupetoj kun posta raportado, kaj la lasta estos ĉefe interaga inter ĉiuj, kun nur kelkaj spertoj kiel instigo flanke de la gvidanto.

Renato Corsetti komparis la temon Sankta Francisko kaj la lupoj al paco kaj milito en la nuna mondo:

Kiam oni pensas pri la tempoj de Sankta Francisko el Assisi (1181 - 1226) oni imagas al si la malhelajn tempojn de la ankoraŭ frua Meza Epoko, tempo de militoj kaj perforto. Kaj oni pensas samtempe, ke bonŝance oni vivas nun en nia civilizita socio, kie viroj ne promenas en fera kiraso kaj kun granda glavo. Tamen en la seminario li provas pruvi, ke temas pri malĝustaj pensoj. Milito, murdo per bombado kaj teknikaj iloj kiel la senpilotaj aviadiloj, mirinda modernaĵo, ekonomia ekspluatado kun milionoj, kiuj mortas pro malsato havas nuntempe en la mondo skalon neimageblan por Sankta Francisko kaj liaj samtempuloj. Ĉiu epoko havas siajn sanktulojn kaj siajn lupojn.



Krome estis proponita kursoj por komencantoj kaj progresantoj kaj kurso pri Esperanto-literaturo.

Wera Blanke prelegis pri "Suna lumo tra jarmilo".

Daniela Bottegoni prelegis pri la brajla skribo. Kun la edzo Aldo Grassini ŝi fondis la Ŝtatan Tuŝ-sensan Muzeon "Homero".

Franz Kruse prelegis pri "Unikodo kaj kiel ĝin uzi" .

Nina Pietuchowska klarigis pri la vojo de "Sukceno inter Pollando kaj Italio"

Ekskurso al la monto-supro de Assisi urbo de Sankta Francisko

Malmultaj scias ke la urbo de sankta Francisko estis grava sankta loko por la Umbroj unue kaj poste por la Romianoj, pro la terapiaj fontoj, kies spuroj ankoraŭ videblas en la antikvaj termoj.

Ni unue vizitis historian centron ekde la Baziliko de Sankta Francisko, poste ni atingis, tra la tipaj vojetoj, la Placon de la Komunumo, kie troviĝas la Templo de Minervo (1-a jc a.K.) tre bone konservita. En la kvartalo de la antikva Amfiteatro, kies spurojn eblis vidi en la kurbigo de la tipaj ruĝaj domoj de Assisi. La vizito finiĝis per promenado kaj vizito al la baziliko de Sankta Kvara.

Eblis reveni al la kongresejo piede, sed plej multaj preferis reveni per publika aŭtobuso preskaŭ ĉiuj revenis al la kongresejo, la hotelo Cenacolo.



Ekskurso al la urbo Gubbio en Umbrio, ĝemel-urbo kun Thann en Alzaco

La urbo Gubbio estas unu el la plej bone konservitaj urbo-strukturoj, kiu gardis dum la jarcentoj sen-ŝanĝe la mezepokan stilon, la uzadon de la bela apenina ŝtono, kiu unuecigas la imponajn arkitekturojn de la civila kaj religia povo, ĝis la tipaj turo-formaj loĝejoj. En la urbo estas menciita Sankta Francisko kaj Sankta Ubaldo. Krome la urbo estas ĝemelita kun la urbo Thann en Alzaco. Jen la legendo, kiu ligas la du urbojn.

Legendo pri la kreado de la urbo Thann.

La 16an de majo 1160 forpasis la episkopo Ubaldo Baldassini en Gubbio. En Francio li estas nomata Saint Thiébaud (Sankta Teobaldo). Li estis petinta sian serviston forpreni la episkopan ringon. Kiam la servisto deziris forpreni la ringon ankaŭ forpreniĝis la polekso. La servisto metis la tuton en la pomelon de sia pilgrim-bastono kaj forvojaĝis al sia hejm-lando, Nederlando.

En 1161 kiam li atingis la bordon de la rivero Thur (en la valo de Thann), li ripozis ĉe abio kaj apogis sian pilgrim-bastonon al ties trunko. Vespere kiam li vekigis, la bastono estis kvazaŭ fiksita al la trunko kaj ne eblis ĝin forpreni. Sur la apuda monto ekde la burgo "Engelbourg" la grafo de Ferrette ekvidis tri lumojn super la abio. Li alkuris kaj mirakle sukcesis forpreni la bastonon, kies pomelo malfermiĝis kaj faligis la relikvon. Li promesis konstrui tie kapelon. La urbo Thann disvolviĝis ĉirkaŭ tiu sanktejo.

Nuntempe estas ankoraŭ festata tiu evento ĉiu-jare meze de majo en Gubbio kaj la 30an de junio en Thann.



Katedralo dediĉita al la sanktuloj Jakobo kaj Mariano



Mezepoka kvartalo laŭlonge de la torrento Camignano.



La Palaco de la Konsuloj



La urbo Thann en la 30a de julio

En la 30a de julio estas festata en Thann la festo de la 3 abioj.

Sur la placo de la katedralo estas starigitaj 3 abio-faskoj por simboli la 3 abiojn de la legendo.


Ĉe la noktiĝo ili estas fajrigataj.

Poste sekvas piroteknikaĵoj kaj granda festo en la stratoj de la urbo.

Ekskurso al la lago Trasimeno kaj al la insulo "Isola Maggiore"



Laŭlonge de la lago-bordo floris la antikva Etruska kulturo, en 217 a.K. Tie la Romianoj tragike kaj sango-elverŝe estis venkitaj de Hanibalo. En la mezepoko ĝi estis nomata “la lago de Perugia”, urbo kiu subigis ĝiajn insulojn kaj setlejojn ek de la unuaj dekoj de la dekdua jarcento.



Per buso ni forveturis de Asizo al Passignano. Per ŝipo ni atingis la plej grandan insulon (Isola Maggiore), kie ni konatiĝis kun tipa vilaĝo de la fiŝkaptistoj (Borgo dei Pescatori), kie ĝis antaŭ kelkaj

jaroj eblis renkonti virinojn brodantajn antaŭ la hejm-pordo. La preĝejo de Sankta Mikaelo ĉefanĝelo, vera mirindaĵo pro siaj freskoj, situata ĉe la plej alta loko de la insulo; tamen ne ĉiuj kuraĝis ĝin atingi. Fine ni paŝis laŭ la muzea vojo vizitante la Domon de la Popola Kapitano, kaj la Muzeon de la Puntoloj.

Per ŝipo ni revenis al Castiglione del Lago kie eblis sperti loka specialaĵojn dum tagmanĝo.

Posttagmeze ni vizitis la urbon situantan sur promontoro super lago Trasimeno. Tie eblis viziti la Kastelon de la Leono kaj la rafinitan Palacon de la Corgna.

De la promenejo laŭlonge de la mezepokaj muroj eblis ĝui mirindan panoramon.

De tie ni vizitis la preĝejon Sankta Maria Magdalena, nov-klasikstila, kun ene interesaj verkoj de Bernardo Gozzoli.



Vesperaj distraj programoj kun italaj artistoj



Grazia Barboni interpretis mondfamajn kantojn tradukitajn al Esperanto. La dua parto rilatis al ŝia granda "amo" al Fabrizio de André. Liaj kantoj estas tre famaj en Italio kaj ankaŭ eksterlande. Ŝi jam partoprenis en Colmar la fervojistan kongreson, pri kiu pluraj niaj legantoj ankoraŭ memoras kaj ĝuis ŝian koncerton.



Kjara Raggi koncertis per voĉo kaj gitaro. Eblis ĝui plurajn ŝiajn kanzonojn el ŝia esperant-lingva albumo "Blua Horizonte" En 2019 ŝi sukcese koncertis en Wintzenheim dank'al la iniciato de Michel Basso.



En alia vespero kunkantis ŝia amikino en la itala kaj ŝi en Esperanto.



Ĉe la fino de la kongreso venis al scenejo plej multaj organizantoj kaj kunlaborantoj. La publiko varma kaj danke aplaudis ilin. Multaj ĝisis al la venontjara itala kongreso, kiu okazos en Breŝo (Brescia).

Pommier espéranto

Bonjour,

C'est avec plaisir que j'ai lu dans la revue "la Informilo" n° 194 page 26, d'avril-mai-juin 2021, que notre pommier espéranto avait fait des petits qui se portent bien. J'avais envoyé une vingtaine de greffons à Emmanuel ROLLAND, provenant d'un pommier découvert au sommet d'une de nos haies avec trois belles pommes rouges. Emmanuel m'a dit que, dans ce cas, c'est un nouveau type de pommier et donc qu'il faudrait le nommer. J'ai aussitôt dit :

"*pommier espéranto*". Et c'est ainsi qu'il fut adopté. Les



espérantistes curieux peuvent venir voir le pommier espéranto d'origine. Nous avons nettoyé autour de lui et posé un grillage. Situé à 900 mètres d'altitude, il risque les gelées tardives pour avoir des pommes. Profitez de l'A.G. du 3 juillet

Francis BERNARD président d'EPERANTO-info Les Bories - Col de Coperlac 48210 Mas Saint Chély

Saluton,

Kun plezuro mi legis en la revuo "la Informilo" n° 194 sur paĝo 26 de aprilo-majo-junio 2021, ke nia pom-arbo "Esperanto" ekhavis idojn, kiuj bone fartas. Mi sendis al Emmanuel ROLLAND dudekon da greftaĵoj de pom-arbo malkovrita ĉe la supro de unu el niaj heĝoj kun tri belaj ruĝaj pomoj. Emmanuel diris, ke tia-kaze temas pri nova specio de pomarbo, kiun necesus nomi. Tuj mi diris "Esperanto pom-arbo". Tiel ĝi estis adoptita. La scivolemaj esperantistoj povos veni por vidi la originan Esperanto pom-arbon". Ni purigis tute ĉirkaŭe kaj metis krad-barilon. Ĝi situas je 900 metroj da alteco, ĝi riskas suferi pro malfruaj frostoj antaŭ ol ekhavi pomojn.

Globobs-Internaciaj kaj lokaj novaĵoj tradukitaj en Esperanton el 250 amaskomunikiloj de pli ol 100 landoj

Kiu estas malantaŭ Globobs?

Hocine REGUIDA, 45-jaraĝa, mi loĝas en Francio. Mia kariero estas dividita inter IT kaj la humanitara sektoro. Ekde la komenco de 2021 mi laboras pri ĉi tiu ambicia projekto, ideala okazo, kiu kondukis min eklerni Esperanton.

Kial Globobs?

La misio de Globobs estas antaŭenigi interkulturecon kaj malfermitecon de iliaj legantoj donante al ili al nefiltritajn informojn por helpi ilin pli bone kompreni la mondon en kiu ni vivas.

Defioj de Globobs

Kreante Globobs, mi aspiras oferti sendependan retejon, kie la libereco de ĉiuj opinioj estos respektata. Kun iom pli ol 100 landoj kovritaj kaj preskaŭ 300 amaskomunikiloj ĉe la lanĉo, la celo de Globobs estas kovri ĉiujn sentemojn en ĉiuj landoj kaj tiel doni al la leganto la ŝancon vidi la mondon alimaniere. La celo estas ambicia, sed ni kredas je ĝi. Mi ankaŭ aspiras certigi striktan politikon pri protektado de datumoj, evitante dividi viajn datumojn kun publikaj kaj privataj aktoroj. Tial mi elektis apriorie ne fidi je reklamaj enspezoj por financi Globobs. Pro ĉiuj ĉi tiuj kialoj, post la lanĉa periodo, ni ofertis al vi justan abonsistemon. La defioj estas multaj: plibonigi la maŝintradukan sistemon, disvolvi funkciojn, permesante eĉ pli efikan aliron al ĉiuj ĉi tiuj fontoj, validigi daŭrajn kaj justajn partnerecojn kun ĉiuj amaskomunikiloj, ktp. Globobs devas do baziĝi sur ekonomia modelo farebla por atingi ĉi tiujn celojn. Do mi fidis vian subtenon.

Dankon, Hocine REGUIDA Fondinto de Globobs

<https://globobs.com/>

Promenado en Graufthal la 29an de aŭgusto

Jam de multaj monatoj, la grupo de Nancy deziris organizi en Graufthal Esperanto-tagon ĉirkaŭ la rokdomoj, en nordaj Vogezoj proksime de Phalsbourg.

Bedaŭrinde, antaŭ du jaroj, malbona falo devigis Liliane enhospitaliĝi dum pluraj semajnoj kaj lastjare la pandemio denove nuligis nian projekton.

Finfine ĉi jare, okazis ioma paŭzo en la malbona tempo, kaj Liliane povis realigi la prokrastitan promenadon,

Kompreneble ne alvenis multege da samideanoj, Tamen naŭ, kio ne estas tiom malmulte, en la nuntempaj cirkonstancoj kaj en dato, kiam ankoraŭ iuj ferias aŭ aliaj pretiĝas por la rekomenco de la aktivado,

Ni kore dankis al Inge kaj Jürgen, kiuj longe veturis el proksimeco de Stuttgart speciale por la okazo kaj donis tiel al la kunveno internacian etoson.


Post agrabla kaj bona manĝo en restoracio de Oberhof, ni rapide rigardis la restaĵojn de mezepoka monaĥejo nuntempe elfosata.



Graufthal fotita



Grava cerbumado:
Kion elekti por la manĝo?



Jen la ilustra desegnaĵo en la infan-libro "Blukat"

Poste ni vizitis la rokdomojn. El tiu loko, Madette Ast

verkis la ilustritan infanan rakonteton "la blua kato" eldonitan de Esperanto Nancy 54 en tri lingvoj: Esperanto, franca kaj germana. Dank'al klopodado de Liliane, la enirdomo de la loko nun akceptas proponi tiun libreton al la vizitantoj.

Post la vizito, ni faris agrablan promenadon en la proksimeco, malkovrante agrablan pejzaĝon. . . kaj la lageton de la rakonto!

Kaj ĉiuj ĝisrevidis unu la alian, kontentaj pri tiu tago, kiu aspektis kiel ekrevigliĝo de la regiona esperanta vivo post du jaroj da preskaŭa izoleco!

Apartajn dankojn al Liliane por la organizado de la tago.

Jean-Luc Thibias

Jen la komentoj de Bernard Behra pri tiu tago :

Estis bela tago por niaj esperantistaj sentoj kaj nia humaneco : okazo travivi simplajn, rektajn kaj respektemajn rilatojn inter homoj. Do "homoj kun homoj". Dankon por ĉio.

Mi aldonus: ke mi vere ŝatis la etoson kaj la bonan organizadon de tiu renkontiĝo kaj vizito, kaj ankoraŭ nun restas tre kontenta havi denove okazon renkonti verajn esperantistojn en vera vivo, ĉar kunvenoj per komputilaj ekranoj aŭ virtualaj kunvenoj rapide lacigas min, kapdoloroj, ktp.

VIZITO al POZNAN de Michel Basso

En februaro kaj junio, mi vizitis dufoje la belan urbon Poznan, dank'al Erasmus-studado de mia filino en la Universitato UAM de Poznan, ne pri Esperanto ĉar tie ja estas fako pri Esperanto kaj interlingvistiko, sed ŝi studis Bioteknologion. En februaro malgraŭ la pandemio, mi vizitis la urbon kaj renkontis esperantistojn.

Ni aperitivumis ekstere sur la centra placo Stary Rynek, tie Ela Malik ĉiceronis por ni tra la urbo.

Tre plaĉis al mi Poznan, kaj mi decidis fari fotojn dum mia kelktaga restado por desegni kaj eldoni poŝtkarton en Esperanto. En junio mi reiris kaj kunportis la ekzemplerojn por donaci ilin al la Esperanto-klubo.

Tiam mi vizitis la sidejon de Esperanto-Senco, Esperanto asocio de Poznan, kaj kun kelkaj membroj ni vespermanĝis apud la lago de Poznan "Malta" en georgia restoracio. Mi esperas iam reiri tien.



FERVOJISTA FESTO EN BLAINVILLE DAMELEVIÈRES LA 26AN DE JUNIO

Pere de Bruno Henry, la Franca Fervojista Esperanto Asocio invitis la grupon de Nancy kunpartopreni la Kulturalan Feston de Fervojistoj en Blainville-Damelevières, granda fervoja centro inter Nancy kaj Lunéville.

Nia budo estis iom aparta de la ĉefaj allegejoj de la festo, do ne svarmis la vizitantoj! Tamen la kelkaj pasantoj montriĝis tre interesataj.



...Kaj finfine post longa pandemia periodo, eblis komune pikniki, dum bela somera tago -apud refreŝiga naĝejo!

Dankon al nia fervojista samideano Christian Dardenne, kiu trajne trairis Francion por deĵori ĉe la budo kun Liliane kaj Jean-Luc,

Nia foto-paĝo



Somere en Slovakio, floroj ka fungoj



Septembra somero en Alzaco, floroj kaj lageto

